

Leterkesto-4, kaj pri la kasedo Nicolin

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1988 decembro 01.

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1988-29/SRI-1988-29-A-3-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto-4-kaj-pri-la-kasedo-Nicolin.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond nome de Svisa Radio Internacia.

Hodiaŭ ni komencos nian elsendon aŭdigante al vi el la kasedo 'Nikolin' eldonita de LF-KOOP. Jes la ero 'D-ro Zamenhof' kiu turnos viajn rigardojn al Bialistoko, nun tre fama urbo pro la baldaŭa konstruo de esperanto-centro.

(muziko)

Cl.- Ni salutu geaŭdantojn, kiuj skribis.

A.- ESPERANTO-SOCIETO STUTTGART sendis salutojn.

ESTONA RADIO elsendas regule en esperanto. Tion sciigas informilo. Al niaj radiokolegoj en Tallin ni esprimas niajn varmajn bondezirojn.

La revuo EŬROPA UNIO, la organo de Hispana Esperanto-Instituto, reproduktis kovrilpaĝe de sia maja-junia numero 1988 titolpaĝon de unu el la programoj de nia Svisa Radio Internacia.

Pál FELSŐ en Pécs, Hungario, ŝatas niajn programojn pri la pioniroj de la movado.

Sydney FOX en Cambridge, Britio, aŭdis kun intereso nian elsendon pri la fratoj Jean kaj Jules BOREL kaj pri la libro "Sub la neĝo". Li skribis: "Mi gratulas vin pri la flueco kaj klareco de via parolata esperanto, kiu estas kaj facile komprenebla kaj tre belsona."

Cl.- Ni dankas pro la laŭdoj.

GERMANA ESPERANTO-JUNULARO organizas ĉiuvintre Internacian Seminarion. La 32-a okazos en la ĉarma urbeto Traben-Trarbach ĉe Mozelo de la 27-a de decembro 1988 ĝis la 3-a de januaro 1989 kaj havos kiel temon: Religioj kaj ideologioj en Eŭropo. Jen kiel estas resumita tiu programo: "La temo de la ĉi-jara Internacia Seminario estas ege vasta: Diversaj religioj kaj ideologioj abundas en Eŭropo - kaj el tio ofte rezultas multfacetaj konfliktoj, kiuj iagrade influas ankaŭ vian ĉiutagan vivon. Jen elekto de la antaŭvidataj prelegoj kaj laborgrupoj: "kristanismo - hieraŭ kaj hodiaŭ", "la judoj kiel popolo kaj religia komunumo", junularaj sektoj, homaranismo kaj universalaj religioj, marksismo kaj novkonservativismo, la tensioj inter la ideologia kaj religia polusoj, ktp, ktp." Riĉa programo, kiun ni konsilas al ĉiuj junuloj.

A.- Lucien GILTEAUX en Croix, Francio, ne nur aŭskultas niajn elsendojn. Li ankaŭ raportas pri ili en siaj artikoloj pri esperanto por nacilingvaj gazetoj, kiel atestas eltranĉaĵoj, kiujn li sendis, kaj kiujn ni konservas en Centro de Dokumentado kaj Esploro pri la Lingvo

Internacia en la Biblioteko de la Urbo La Chaux-de-Fonds. Tiuj artikoloj pri esperanto fariĝas minejo da informoj pri la ĝenerala publika opinio koncerne esperanton.

Cl.- D. B. GREGOR en Northampton, Britio, skribis: "Mi dankas pro via elsendo pri Lapenna. Mi ĝuis vian tre ĝustan pritakson de liaj atingitaĵoj."

Ni salutas Will GREEN en London, Britio,
Claude GUENOT en Antony, Francio,
Walter HEIDE en Wiesbaden, Germanio okcidenta.
HES-INFORMILO, la organo de Hamburga Esperanto-Societo, raportas, ke en junio en la programo estis aŭskulto de sonbendo pri Svisa Radio Internacia. La temo estis: "Junuloj kaj edukado".

Bonan tagon ankaŭ al Helmer KOCH en Schöneck, Germanio orienta.

Adriana HEWAKOWSKA en Kartuzy, Pollando, kiu eklernas esperanton kaj serĉas korespondantojn.

Leus HORDIJK en Vlaardingen, Nederlando kaj

HORIBE Hiroshi en Inazawa, Japanio.

A.- JUGOSLAVIA STELO, la organo de Jugoslavia Esperanto-Ligo, en artikolo de G. SREDIĆ, titolita „Pasis la jubileo“ konklude diras: "Kaj kio okazas nun? Nun la inundo de artikoloj, elsendoj kaj intervjuoj retiriĝis al normala nivelo. "Nia diligenta kolegaro" plejparte laciĝis (iuj eĉ ŝajne totale elĉerpiĝis) kaj dormetas nun sur laŭraj kronoj de atingitaj jubileaj sukcesoj. Kial daŭrigi en la sama ritmo kaj ĉu tio estas ebla kaj necesa, ili kvazaŭ demandas. Ni sufiĉe ekscitis la publikon, ĝi ja nun sola venos manĝi el niaj manoj... Tian starpunkton mi ne povas akcepti. La publiko ĝenerale en la mondo estas superŝutita ĉiutage per miloj kaj miloj da informoj. Nur malgranda parto el ili restas en la memoro kaj efikas daŭre. Inter ili precipe tiuj kiuj estas ofte ripetataj..."

Cl.- KATALUNA ESPERANTISTO, la oficiala organo de Kataluna Esperanto-Asocio, raportas pri Enketado ĉe Gimnazioj. Ni citas tiun artikolon. "Laŭ propono de Itala Instituto de Esperanto kaj de ties gvidantino s-ino Elisabetta FORMAGGIO, ni aranĝis enketadon ĉe katalunaj mezgradaj lernejoj per enketilo ricevita de la iniciatintoj, kiu titoliĝis "Demandaro pri la opinio de la gejunuloj rilate al la lingva interkompreniĝo en la mondo". Ni sukcesis enketi ĉe 4 gimnazioj en Blanes, Manileu, Vilafranca de Penedes kaj Barcelono, danke al la kunlaboro de niaj gesamideanoj... Entute ni ricevis 467 enketilojn kaj 128 el ili (27%) deziras pluinformiĝi pri Esperanto. Principe nia semado aŭguras fruktodonan rikolton, ĉar post la enketado en Manileu ni estis ĝentile invititaj de la direktoro de la tiea gimnazio rekte informi kaj prezenti ekspozicion. Tio okazis la 9-an de majo fare de nia ĝenerala sekretario... kaj de la junaj aktivuloj... Ni fidas ankoraŭ pri novaj atingoj rezulte de nia enketado, pri kiuj ni tre volonte informos nian legantaron. Ankaŭ ni informos venonte pri la rezulto de la kompleta enketado je eŭropa nivelo, kiu okazis samtempe en pluraj landoj." Ni citis fakte tiun artikolon por reliefigi la gravecon de tiuj enketaj kontaktoj kun la publiko. Tre ofte tiuj

enketoj atentigas por la unua fojo la koncernatojn pri la ekzisto de esperanto kaj vekas intereson. Sed kiel montras tiu citita artikolo, multaj kunlaboroj estis necesaj por efektivigi tian agadon.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras al vi :
Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), januaro 2014*